



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

Año XVII N° 239

MAYO-JUNIO 1980

XL-a HISPANA ESPERANTO KONGRESO



Unu el la famaj pentraĵoj de Goya, vizitebla en la Muzeo Prado de Madrid.

**BOLETIN
DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO**

DIRECTORA:

D^a M^a Aurora Vitoria Nieto

DIRECCION

Y ADMINISTRACION:

Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

REDACTOR JEFE:

D Salvador Aragay Galbany
Bassegoda, 40 - Telf. (93) 3338081
BARCELONA 28

COMITE DE REDACCION:

D. Giordano Moyá
D. V. Hernández Llusera
D. Gabriel Mora y Arana
D. Pedro Nuez

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinionon de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komunikoj; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinionon de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

**UTILAJ
ADRESOJ**

HISPANA ESPERANTO FEDERACIO
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Prezidantino

M^a Rafaela Urueña-Alvarez
Avda. Ramón y Cajal, 12-2^o-C
Télf. (983) 260086
VALLADOLID

Sekretario

Luis Hernández García
adreso kiel supre

Kasistino

Carmen Conde Labajo
Calixto Valverde 8-8^o-A
VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto
N^o 001.664-0
Caja de Ahorros Popular
Ag. Urbana E.
A. Lorenzo Hurtado, 1
VALLADOLID

LIBRO-SERVO DE H.E.F.

Jacinto Urueña Antón
Dos de Mayo, 4
VALLADOLID

Pagoj por Libro-servo, sendu al
Caja de Ahorros Popular
Oficina Central
Cuenta N^o 042.268-4 a nombre de
LIBRO-SERVO DE H.E.F.
VALLADOLID

ELDONA FAKO

Inés Gastón
P^o de la Constitución, 35-4^o
ZARAGOZA-1

INFORMA FAKO

Ramón Molera
Sta. Joaquina, 13
MOYA (Barcelona)

ĈEFDELEGITO DE UEA

Juan Azcuénaga Vierna
Capitán Palacios, 3-4^o-N
SANTANDER

RENOVIĜI AŬ MORTI

Verkis: Félix Gómez

Tradukita de Luis Martín Herrero

Antaŭ multaj jaroj, kiam mi ankoraŭ estis infano, oni irigis min vidi cirkaĵojn. Tiam mi eltrovis la cirkajn mirindaĵojn: la dancistojn, la akrobatistojn, la pajacojn, idoloj de ĉiuj infanoj, kun siaj trankviliga ĉeesto kaj freŝa, ĉarma sprito. Precipe mi eltrovis tiujn-ĉi pajacojn. Unu el ili estis ruĝe vestita kaj la alia surportis brilan kostumon kun brilaj disketoj kaj grandega kravato. Ili estis la klasika formulo: La paro. Unu reprezentis la malgracion, la obstinecon kaj la nescion. Li ĉiam ricevadis la vangofrapojn. Li estis kiel spektakla efekto. Kaj la alia... Sed ambaŭ estis artistoj kun sprito, mimikemaj kaj dotitaj de specialaj komikaj kondiĉoj. Mi memoras el mia infaneco, ke tiu de la blanka vizaĝo regalis min per unu el la ruĝaj, bluaj kaj flavaj globetoj portataj en la dekstra mano forte engantigita. Fine ili kunvenis sur la areno kun ĉevaloj, kameloj kaj hindaj muzikistoj kaj negraj kantistoj. Tio estis la apoteozo de la sensacio, la granda parado.

Mi ĉeestis multajn prezentadojn laŭlonge de mia vivo. Unu el tiuj estis en la Granda Cirko Price de Madrido. Sidante sur ŝtupo-benke de la ronda areno mezuranta 13 aŭ pli da metroj da diametro, mi rigardadis la varian spektaklon. La akrobatistoj ĵonglis rajdante sur du aŭ tri ĉevaloj, la fajromanĝistoj, la piruetistoj, la sabroglistoj, la ĵonglistoj kaj ekvilibristoj, ...ĉio min transportis al mondo kie ĉio eblas, emocia kaj bela. Ĉar en la cirko nenio havas limojn. En la cirko ĉiam ekzistas la «ankoraŭ pli malfacila».

Plurajn semajnojn poste, Parizo, Romo, Stokholmo, Berlino, la granda cirko trakuras la malnovan kontinenton de unu flanko al la alia kun la entuziasmo de la profesia alvokiĝo kaj la kontentiĝo pro la triunfo, pro la ĝojo feliĉigi la aliajn. Kaj ĉio tra fabela rulanta mondo, plena je lumoj kaj koloroj, je novaĵoj kaj malsovaĝigitaj bestoj, sed ankoraŭ tiel danĝeraj.

Sekvas la prezentadoj, pomile. Tamen kvankam la publiko ankoraŭ akceptas la prezentojn entuziasme kaj ne rimarkas ian ŝanĝon en ĝia interno, io mortas en la cirko. La vero estas ke la panoramo ŝanĝiĝis preskaŭ tute. Oni devas renoviĝi tagon post tago kaj agadi laŭ la nunaj cirkonstancoj kun la talento kaj nevas peno. Trovi impresariojn kapablajn plu lukti por garantii ĝian daŭron, kiel Franconi, Barnum, Bailey kaj multaj aliaj kuraĝegaj iniciatintoj de la grandioza kaj malfacila spektaklo.

La repertuaro de rulanta cirko konsistas el la tradiciaj cirkaĵoj kun aldonoj de la universala aktualeco. 1979-a Internacia Jaro de la Infano. Superhomo, la herooj de la galaksioj, la vivantaj rolantoj de Walt Disney kaj tiel plu, faras la plezuregojn de la infanoj kaj ceteraj rigardantoj, kaj vekas ankoraŭ gajecon kaj admiron kie ajn. Kaj pro entuziasmo la okuloj de la infanoj elorbitiĝas kaj iliaj buŝoj ridas dum la manoj aplaŭdas fortege. Ili estas la novaj generacioj kiuj renovigas sian admiron. La zorgo estas ke la cirko ne defalu kaj ke la spektaklo faru la impreson ke ĝi ankoraŭ pludaŭrigos. Ke ĝi ne stagnu en rutinaj elprezentoj. Sed multaj artistoj forlasas la cirkon ĉar ili estas dungataj por muzikhaloj, por varieteaj teatretoj kaj por televidaj programoj. Fakte la vivo de la cirko ŝanĝiĝis multe kaj tio konata kiel «familia klano» preskaŭ jam ne ekzistas.

Kio okazis al la cirkoj?...

FUNDACION «ESPERANTO»

Internacia Literatura Konkurso

La Patronaro de la «Fundación ESPERANTO» decidis dum kunsido okazinta la 29-an de februaro 1980-a organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos du premioj:

1^o. Premio «Sancho-Rebullida», 10.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

2^o. Premio «Fundación ESPERANTO», 5.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj originalaj verkoj libervole elektitaj en la temoj: Popola Rakonto aŭ Priskribo pri urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj moroj.

REGULARO

1. Ĉiu konkursaĵo ampleksu 4-5 foliojn.
2. Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj.
3. La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
4. Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
5. La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkursaĵojn estas la 30-a de septembro 1980-a.

La Verdikto publikiĝos en la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1980-a.

Kun la indiko: Por la Konkurso de «Fundación ESPERANTO»; oni sendu la tekstojn al: Inés Gastón. P^o de la Constitución, 35, 4^o dcha. ZARAGOZA-1. Hispanujo.

Zaragoza la 20-an de marto de 1980-a

Inés Gastón

Sekretario de la

«Fundación ESPERANTO» kaj de la Konkurso

«HEROLDO» FARIĜAS 60-JARA

En aprilo 1920, ekzakte antaŭ 60 jaroj, aperis en la vilaĝo Horrem apud Kolonjo (Germanio) la unua numero de la sendependa internacia gazeto «Esperanto Triumfonta», kiu kelkajn jarojn poste alinomiĝis «Heroldo de Esperanto».

Ĝia tiam 26-jara fondinto, Teo Jung, kun granda optimismo, fervoro kaj obstino gvidis ĝin kaj dum pli facilaj jaroj — kiam la gazeto, en la 20-aj jaroj — aperadis 10-paĝa dufoje semajne, kaj dum pli malfacilaj jaroj, kiam li en 1936 devis forlasi sian propran landon kaj instaliĝi en Scheveningen (Nederlando).

En januaro 1962, pro emeritiĝo, Teo Jung transdonis la gazeton al Ada Fighiera-Sikorska, kiu plue redaktas ĝin. Tiu-ĉi nova periodo de la redaktado okazis unue dum 17 jaroj en Bruselo, kaj ekde aprilo 1979 ĝi efektiviĝas en Madrido.

La 14-an de aprilo 1980 aperis la 1664-a numero de «Heroldo de Esperanto», kiu daŭre estas la plej

ŝatata kaj la plej ofte aperanta internacia Esperanto-gazeto.

En 1979 «Heroldo» eldonis «Tra dezerto kaj praarbaro» de H. Sienkiewicz, pola literatura Nobel-premiito 1905. Nun en preparo estas: la kvara eldono de «Paŝoj al plena posedo» de W. Auld (la tria eldono jam elĉerpiĝis), la eldono de modernaj lernolibroj en la franca, angla kaj hispana.

En la pasintaj jaroj «Heroldo» eldonis kelkajn «Sciencajn Suplementojn»: ekzempleroj de la lasta pri «Mensa sano» kaj «Matematiko» estas senpage haveblaj ĉe la adreso de HdE, C/ J. Ramón Jiménez, 28, 6^a A; Madrid. 16. Oni povas ankaŭ mendi la duoblan kongresan numeron aperontan en septembro.

Detala historio de «Heroldo» ĝis 1962 estas priskribita en la biografia libro de Teo Jung «Ĉiu ĉiun», aperinta pasintjare ĉe la eldonejo TK/Stafeto, Schoten.

A. F.

KONKURSO - KONKURSO - KONKURSO

Situacio kaj perspektivo de l'junularo de mia lando

Jen vi povas skribi pri viaj zorgoj, ĝojoj, planoj, ideoj, idealoj, problemoj kaj tiuj de viaj samaĝuloj. Kriterioj por la prijuĝo estos, ke sufiĉe, plaste kaj klare leganto en tute aliaj medioj kaj kontinento povas kompreni vian situacion. Komprenible ankaŭ stilo, lingva korekteco kaj skribmaniero estos juĝataj.

Partopreni rajtas ĉiu en la aĝo de 12 ĝis 20 jaroj; ne forgesu indiki viajn aĝon kaj adreson (en klara skribo!).

Limdato estas la 30a de aŭgusto 1980 (dato de la poŝtstampo). Sendu vian manuskripton sub la rubriko «junulara konkurso» al MONATO. S. Maul, Holbeinstr. 11, D-7970 Leutkirch, FR GERMANIO.

Premioj: 1-a premio 100,— gmk.
2-a premio 50,— gmk.
3-a premio 30,— gmk.

Krome multaj valoraj libroj, sondiskoj ks. La plej bonaj verketoj estos publikigataj. Multan plezuron ĉe verkado kaj bonan sukceson deziras via MONATO.

Esperantista Labortago por geprofesoroj de Ĝ. B. E. en Alicante

Kiel anoncite, la 19-an de aprilo okazis en la sidejo de la Grupo Esperanto de Alicante, la labortago de studo kaj esperantista kunfratiĝo por esperantistaj geprofesoroj de G. B. E. de Alicante kaj provinco. Organizis la eventon la Hispana Sekcio de I. L. E. I. Post la ĝenerala akcepto kaj la kutimaj salutoj de gekolegoj kaj amikoj alvenintaj de la plej diversaj punktoj de la provinco, oni disdonis gravan teknon enhavante interesan esperantan materialon. La granda salono kie okazis la evento estis plenplena kaj la muroj, bele ornamitaj per granda bandafiŝo petante la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Pluraj esperantaj flagoj beligis la salonon. Prezidis la Katedristino Beatriz Inés Martín; la Provinca Delegito de la Ministerio pri Edukado; la Direktoro Vicente Molins Reig; la Direktoro Juan Antonio Gimenez, de Valencia k.t.p.

Unue, S-ro Zaragoza, Vicsekretario de I. L. E. I., salutis la ĉeestantaron dirante ke kaŭze de la 959 personoj aliĝintaj al la elementa koresponda kurso, de la 50 provincaj delegitoj de I. L. E. I., kaj de la 360 membroj nuntempe konsistigas la hispanan sekcion de I. L. E. I. ni povas certe paroli pri sukceso en la disvastiĝo de Esperanto en nia lando. Fine, li bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn dezirante feliĉan restadon kaj fruktodonan labortagon.

Sekve, salutis S-ro Giménez, nome de la valenciaj gekolegoj, Francisco Muñoz Garre, nome de la studentaro invitis ĉiujn partopreni la esperantan renkontiĝon okazonta en Murcia la 18-an de Majo, S-ro Navareño, nome de la Madridaj gekolegoj. Sekve, S-ro José M. Bernabeu Profesoro gvidanto de la supera koresponda kurso parolis pri la alta valoro de la polurado de niaj esperantaj konoj kaj de la graveco de la kunfratiĝaj kunvenoj. Poste, oni legis salutojn ricevitajn de Prof. Sacramento Collado, Provinca Delegito en Oviedo, kaj de S-ro Puig Prezidanto de Centro Esperanto Sabadell.

Poste oni pritraktis la temojn: «Didaktiko de la esperanta konversacio», «Demandoj kaj respondoj», «Rolo de Esperanto en la lernejo», kaj «Sugestoj por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn».

Per trafaj vortoj, S-ro Sánchez Antón, Delegito de I. L. E. I. por la kasedoservo, prelegis pri «Didaktikaj kriterioj rilate la instruadon de la Internacia Lingvo». Finfine, la Hispana Sekciestro de I. L. E. I. S-ro Zaragoza prezentis per taŭgaj vortoj la fortikan personecon de la funkciulo S-ro Dionisio Recio, kiu multe helpis la agadon de I. L. E. I., esprimante la kortusan senton pro la forpaso de tiel kara amiko kaj kunlaboranto al lia vidvino Katedristino Beatriz Inés Martín, al kiu oni donis Diplomon pri Esperanto kiel pruvo de nia profunda estimo por li.

Frata bankedo kun ĉeesto de pli ol 60 personoj kaj libervola promenado tra la urbo, metis finan punkton al tiu grava labortago.

Oni devas substreki la apogon de la Sparkaso de Alicante kaj Murcia kiu proprakoste eldonis afiŝojn kaj programon, kaj donacis belajn tekojn por la gepartoprenantoj.

F. Z. R.

ZAMENHOF KAJ LA HISPANA LINGVO

Bernard Golden

Ĉu d-ro Zamenhof konis la hispanan linvon? Movadhistoriistoj ĝis nun pleningis multajn paĝojn de revuoj kaj erudiciaj publikigaĵoj per pritraktoj de la lingvosciencoj de la aŭtoro de Esperanto. Unuj strebas pruvi, ke li sciis tiun aŭ alian lingvon; aliaj argumentas, ke ne ekzistas dokumentado apoganta tiujn asertojn. Inter la plej gravaj eŭropaj lingvoj, ŝajnas, ke la hispana estis iom neglektata. Ankoraŭ ne trafis en miajn manojn verko, kies aŭtoro sukcese pravigis hipotezon, ke Zamenhof lernis la hispanan.

Trakribante la verkojn de Zamenhof mem, oni povas trovi kelkajn menciojn pri la hispana lingvo. La plej frua teksto estas la «Unua Libro», eldonita en 1887. En la 2-a parto de la «Antaŭparolo», Zamenhof skribis:

«Se vi deziras skribi, ekzemple al iu hispano Madridon, sed nek vi scias lian lingvon, nek li vian, kaj vi dubas, ĉu li scias la lingvon internacian aŭ ĉu li eĉ aŭdis pri ĝi... vi bezonas nun skribi leteron en la lingvo internacia, enmeti en la leteron hispanan ekzempleron de la vortareto, —kaj la adresito vin jam komprenos...».

Kompreneble, kiam aperis tiu unua publikigaĵo en Esperanto, ankoraŭ ne ekzistis hispanlingva vortareto aŭ ŝlosilo; ĝi estis verkita du jarojn poste.


La titolo de la unua Esperanta-hispana vortaro estas **Esperanto: Diccionario de las lenguas internacional y española**. Presis ĝin Ch. Kelter en Varsovio en 1889. Ĝi estas listigita en la nomaro de verkoj pri Esperanto sub n-ro 26. E. de Wahl. **Vortaro Esperanto-Hispana**. La verko konsistas el antaŭparolo sur ok

paĝoj kaj dupaĝa vortara folio. La aŭtoro, Edgar Alexei von Wahl /1867-1948/, estis baltgermano, loĝanto de Reval /nuntempe Tallinn/, Estonio. Li estis oficiro de la rusa milita maristaro kaj poste oficis kiel instruisto pri la matematiko kaj fiziko en supera reallernejo. Li esperantistiĝis en 1888 kaj korespondis kun Zamenhof pri lingvaj demandoj. Von Wahl /aŭ de Wahl/ lernis la hispanan lingvon en Moskvo, dum li preparis sin al la ekzameno de maroficiro.

En 1892 d-ro Zamenhof sendis poŝtkarton al Edgar von Wahl, kiu enhavas jenan frazon.

«La hispanan libron s-ro Rodríguez Huestas [tiele!] eldonas nun por la mono kolektita de la «Esperantisto» kaj tial li nun faros en la lingvo nenian ŝanĝon, kaj la tutan esperantan parton mi mem atente trarigardos».

Temas pri projekto de nova lernolibro por hispanoj verkota de José Rodríguez Huertas, kiu esperantistiĝis en 1890 kaj fondis la Esperanto-societon de Málaga en 1892. Lia unua lernolibro, presita de Manuel Cerban en Málaga, aperas sub n-ro 36 de la nomaro de verkoj pri Esperanto kun tiu ĉi titolo: **J. Rodríguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. /Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana/**. Sed ŝajnas, ke tiu hispana titolo ne estas tute ĝusta. Alia fonto citas ĝin jene: **Gramática, ejercicios y diccionario de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto**. Rimarku la uzon de la vortformo **linguo** en la titolo anstataŭ **lingvo**. Rodríguez Huertas enkondukis aliajn ŝanĝojn, an-



tataŭgante la literojn j per y kaj ĵ per ĵ, forigante la akuzativon, kaj modifante parton el la fundamentaj radikoj. Skribante en **Lingvo Internacia** en 1896, d-ro Zamenhof informis la legantojn, ke ĉe li estas manuskripto de plena lernolibro por hispanoj, por anstataŭi la verkon de Rodríguez Huertas, «kiu tute ne povas esti uzata...». Supozeble, Zamenhof kontrolis nur la Esperantan parton de tiu manuskripto, same kiel li faris rilate la novan lernolibron de Rodríguez Huertas. Ne estas klare, ĉu la manuskripto kaj la projektita lernolibro de Rodríguez Huertas temas pri la sama verko. Laŭ **Bibliografio de Internacia Lingvo** de Petro Stojan, la postaj lernolibroj por parolantoj de la hispana lingvo estis eldonitaj en 1901: du en Madrid kaj po unu en Lima, Peruo, kaj Santiago, Ĉilio. Inter ili ne estas verko de Rodríguez Huertas.

En &34 de la «Ekzercaro», eldonita en 1894, troviĝas jena frazo.

«Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis iom vian leteron».

Esperantologoj substrekas, ke pluraj frazoj en la «Ekzercaro» spegulas la personajn travivaĵojn kaj hejman vivon de la juna Ludoviko Zamenhof. Ekzemple, «La infanoj ploras, ĉar ili volas manĝi» en &16 eble estas aludo al la gefratoj de Ludoviko, kiu malsatis kaj pro tio ploris. Ĉu, do, oni interpretu la cititan frazon pri la hispana lingvo sammaniere? Se Zamenhof ne havis scion pri la hispana lingvo, li ja povis posedi hispanan-germanan vortaron. Aŭ eble tia verko apartenis al lia patro, kiu estis instruisto pri fremdaj lingvoj. Manke de apogo de dokumenta fonto, tiu konjekto devas resti nur spekulativa.

La sekva mencio de la hispana lingvo en verko de la aŭtoro de Esperanto okazis ankaŭ en 1894. En plurparta artikolo titolita «Pri reformoj en Esperanto», kiu aperis en **L'Esperantisto**, d-ro Zamenhof skribis en n-ro 2.

«Por ke la karaktero de la tuta lingvo, estu pli unuforma kaj ne simila al ia neharmonia miksaĝo, mi proponus /dank' al la romana fundamento de nia lingvo/ evitadi vortojn germanajn aŭ slavajn kaj preni, kiom ĝi estos ebla, nur el lingvoj romanaj /latina [la plej bone], itala, hispana k.t.p./».

Estas evidente, ke oni ne povas pruvi, ke Zamenhof konis la hispanan lingvon, nur surbaze de citaĵoj el liaj verkoj menciantaj tiun lingvon. Alia teritorio invitas esploron: la lingvo mem. Kiom da leksikaj elementoj en Esperanto venas de hispanaj etimoj? Tie ĉi ne temas pri hispanaj etnonimoj, kiuj estas uzataj en pluraj lingvoj preskaŭ senŝanĝe, ĉar adekvata traduko ne ekzistas. Tri zamenhofaj ekzemploj estas: **kastanjeto**, **mantilo** kaj **realo**. La Esperantaj vortoj, kiujn ni devas serĉi, estas tiuj, kies signifo ne rilatas al apartaĵo de la hispana kulturo, sed kies formo indikas devenon nur de hispana etimo. Ekzemple, estas erare supozi, ke «ĉielo» estas hispandevena, ĉar ĝi tre similas al **cielo**; ankaŭ la itala **cielo** kaj franca **ciel** estas same similaj.

Ekzameno de la pra-Esperantaj projektoj de 1878 /**Lingwe Uniwersala**/ kaj 1881-1882 ne malkovras en tiuj relative malabundaj tekstoj vortojn de certa hispana origino. Ankaŭ la Esperanto de 1887 estas libera de hispana influo. Male, kiam oni analizas la projektitan

reformitan Esperanton de 1894, oni povas trovi kelkajn vortojn, kiuj sendube venis de la hispana.

Zamenhof verkis tri versiojn de la Patronia en sia nova reformita «dialekto» de Esperanto. La kvina linio tekstas jene.

a. «Mie omnudie panon donuh a mi hoj.»

b. «Ne cudie panon donuh a nu hoy.»

c. «Mis skelghorne panon donuh a mi hoy.»

La sola ebla etimologio de **hoj** aŭ **hoy** estas hispana **hoy**, «hodiaŭ». Ankaŭ la kvara linio de la preĝo havas hispanan vortformon.

a. «suh te volo kom in el celo sik ak sur tero!»

b. «suh te volo, ke il lo celo, ke anku sur lo téro.»

c. «suh tos volo, ke in celo te ak sur tero.»

En «a» la difina artikolo antaŭ celo estas **el**, en «b» ĝi estas **lo**, kaj en «c» ĝi mankas. La lasta linio de versio «a» estas a. «Sed libriguh min de el malo!»

Okulfrapa estas la identeco inter la hispana maskla singulara artikolo **el** kaj la artikolo **el** en la Esperanto de 1894. Ne estas klare, kiel Zamenhof intencis modifi la prepozicion «el» por eviti homonimecan konflikton.

Por elimini la germandevenan «zorgi», Zamenhof alprenis la verban radikon **kuid**—; kies estimo estas hispana **cuidar**. Al la angladevena «ŝoveli» li substituis **palu**— de hispana **pala**; la aldono de «u» en la radiko estis necesa por diferencigi tiun ĉi verban, radikon disde la adjektiva radiko «**pal**—».

Zamenhof forigis supersignojn en si

reformprojekto, do li devis anstataŭi / plurajn vortojn por novaj formoj. Tiel la francdevenaj «ĉemizo» kaj «paĝo» fariĝis **kamiso** kaj **pagino**, inspiritaj de la hispanaj vortoj **camisa** kaj **página**.

Unu el la sistemaj ortografiaj sanĝoj en la Esperanto de 1894 estis la substituo de «z» al la litero «c». Tiel **kruzo** kaj **plazo** akiris formojn pli similajn al la hispanaj vortoj **cruz** kaj **plaza** ol la respondaj «kruco» kaj «placo» de la hispana Esperanto. Tamen, la prononco restis sensanĝa: z = «ts». La litero c restis en la nova dialekto kun la prononco de la ĝistiamaj «ŝ».

Kvankam «peniko» estas latindevena /**penicillum**/, Zamenhof forigis ĝin favore al **pincelo**, kies plej proksimaj parencoj en eŭropaj lingvoj estas hispana kaj portugala **pincel** kaj germana **Pinsel**. Jen ankoraŭ unu ekzemplo de grafisma akordo kun hispana vorto; la elparolo tamen estas «pinŝelo», kiu fonetisme distancas de la etnolingvaj vortoj.

La ĉi-supraj ekzemploj indikas, ke Zamenhof ja konis la hispanan lingvon kaj ĉerpis radikformojn el ĝi por sia reformprojekto de 1894. Restas precizigi, kiel li akiris tiu scion kaj kiam tio okazis. Se en la hejma biblioteko de la juna Ludoviko aŭ de sia patro ne estis tiu hispanagermana vortaro prialudita en la citita frazo el la «Ekzercaro», estas tre probable, ke Zamenhof utiligis la dupaĝan vortliston de von Wahl, eldonitan en 1889, kaj ankaŭ la gramatikon de Rodriguez Huertas, aperintan en 1890. Waringhien opinias, ke Edgar von Wahl direktis la atenton de la aŭtoro de Esperanto al la hispana lingvo. Tamen, povas esti, ke pli profunda reserĉo malkovros atestaĵon de pli frua interesiĝo pri la hispana ĉe Zamenhof.

Konsultitaj verkoj

DREZEN, E. 1967. **Historia de la Mondolingvo**, Leipzig. /1967, Oosaka/;

HOLZHAUS, A. 1969. **Doktoro kaj Lingvo Esperanto**. Helsinki.

IAM KOMPLETIGOTA PLENA VORTARO DE L.L. ZAMENHOF.

1973. **Unuaj Libroj por Esperantistoj**, Kajero 1. Kameoka, Japanio.

1974. **Ni Laboru kaj Esperu!** Kajero 2. Kioto, Japanio.

1974. **Antaŭen al la Laboro!** Kajero 3. Kioto.

1975. **Tamen la Afero Progresas!** Kajero 4. Kioto.

1979. **La Inkunabloj de Esperanto**, Kajero 1 bis. Kioto.

KOKENY, L. kaj BLEIER, V. 1933-34. **Enciklopedio de Esperanto**. Budapeŝt.

STOJAN, P. 1929. **Bibliografio de Internacia Lingvo**. Geneve. /1973, Hildesheim, New York/.

WARINGHIEN, G. 1959. **Lingvo kaj Vivo**. La Laguna.

WUSTER, E. 1927. **Zamenhof-Radikaro**. Leipzig.

ZAMENHOF, L.L. 1963. **Fundamento de Esperanto**. 9-a eldono. Marmande, Francio.



Partoprenantoj kun membroj de la Folkloro Grupo de Alquerías pozas por Boletín.

XIV-an RENKONTIĜON DE LA ORIENTA REGIONO KAJ MURCIA

La pasintan 18-an de majo okazis en Murcia la jara renkontigo de la Orienta regiono. En salono de la Universitata Lernejo de Ĝ.B.E. okazis la ĉefa programero. Ĉe la prezida tablo estis D-ro Sanz Direktoro de la I.C.E. kaj katedristo pri Fiziko kaj Kemio de la Universitato de Murcia; S-ro Francisco Zaragoza, Vicsekretario kaj Sekciestro de I.L.E.I. por Hispanio; S-ro Luis Hernández, Sekretario de H.E.F.; S-ino Ana María Hernández-Ros Codorniú, nepino de S-ro Ricardo Codorniú unu el la pioniroj de la enkonduko de Esperanto en nian landon kaj fondinto en Murcia de la «Hispana Societo por propagando de Esperanto» kaj de la revuo «La Suno Hispana»; S-ro Verdú de la Esperanto Grupo de Elche; S-ro Francisco Miguel Muñoz Garre, Prezidanto de la Esperanto Grupo de Alquerías

(Murcia) kaj organizanto de la evento; kaj D-rino Maria Rafaela Urueña, Prezidantino de la Hispana Esperanto Federacio, kiu prezidis.

Unue, S-ro Zaragoza per taŭgaj vortoj, reliefigis la gravecon de ĉi tiu renkontiĝo pro tri ĉefaj kaŭzoj: Unue, la ejo kie ni kunvenas, due la persona ĉeesto de S-ino Hernández-Ros Codorniú, kaj trie ankaŭ la persona ĉeesto de la Prezidantino kaj de la Sekretario de H.E.F. Sekve, la plej juna partoprenanto, donacis al la Prezidantino de H.E.F. belegan florbukedon. S-ro Sánchez Antón estis invitita paroli al la ĉeestantaro, fakto kiun li profitis por klarigi la funkciadon de la kasedoservo de I.L.E.I kies prizorganto li estas.

Poste salutis la reprezentantoj de la diversaj Esperanto-Grupoj de la regiono kiuj partoprenis la

renkontiĝon, kaj S-ro Zaragoza legis salutleterojn de pluraj samideanoj kiuj, pro diversaj cirkonstancoj, ne povis ĉeesti.

La Sekretario de H.E.F., laŭ invito de S-ro Zaragoza, parolis esperantlingve reliefigante la ĝojon kiun li sentas pro la multnombraj novaj vizaĝoj de esperantistoj kiuj estas en la salono, kaj kuraĝigis ĉiujn daŭrigi la enterprenitan vojon promesante la helpon de H.E.F. al la novaj kaj ĵus kreitaj Grupoj.

Sekve, S-ro Bernabeu Franco, Delegito de I.L.E.I. por la Perfekta Esperanto Kurso, klarigis esperantlingve, la gravecon de tiaj kursoj, kaj la bezonon legi naciajn kaj internaciajn revuojn por perfektigi la sciadon de esperanto.

Daŭrigante, S-ro Muñoz Garre bonvenigis la partoprenantojn kaj deziris al ĉiuj feliĉan tagon en Murcia.

Kiel ĵus eldonitan libreton, S-ro Zaragoza prezentis la tekston de Marie Therese Mas titolitan «Por qué utilizar la Lengua Internacional Esperanto en un sistema de reconocimiento automático de la palabra» kies traduko de la franca al la hispana li mem faris.

Sekve, D-ro Sanz bonvenigis ĉiujn kaj reliefigis la gravecon de Internacia Lingvo en la internaciaj fakaj kongresoj, ĉar li persone konstatis la lingvajn malfacilaĵojn kiujn, pre manko de komuna lingvo, oni trovas en tiaj kongresoj. Li menciis sian simpatian al Esperanto kies lingvo li studis kaj eĉ tradukas, promesante la tutan ellernadon de la lingvo por paroli ĝin en venonta okazo. Granda aplaŭdado premiis la interesan paroladeton de D-ro Sanz.

Fine, D-rino Maria Rafaela Urueña, parolis hipanlingve elstarante kiel Esperanto ne estas artefarita lingvo, sed kreata lingvo kiu evoluas same kiel aliaj naciaj lingvoj.

Ŝi ankaŭ menciis la taŭgecon de la esperantaj renkontiĝoj, por praktiki la lingvon, kaj kiamaniere la naciaj lingvoj ne taŭgas kiel internaciaj, kaj oni devus uzi internacian lingvon kia estas Esperanto, ĉar ĝi estas propraĵo de la tuta homaro. Fine, ŝi kuraĝigis ĉiujn daŭrigi la enterprenitan vojon kaj dankis la afablan akceptadon.

En la korto de la Universitata Lernejo de Ĝ.B.E. geknaba folkloro grupo de Alquerías prezentis belajn dancojn kaj kantojn de la folkloro de Murcia kiuj ege plaĉis.

Komuna tagmanĝo metis finan punkton al tiu simpatia kaj agrabla renkontiĝo. Notinde estas ke je la fino, la esperantistoj de Alquerías donacis pakaĵon enhavante oranĝojn kaj citronojn de la Murcia legomĝardeno kiun la tuta ĉeestantaro ricevis kun surprizo kaj plezuro.

L. Hernández



Kelkaj gartoprenantoj en la Renkontiĝo

Notas de interés para todos los federados

CURSO ELEMENTAL DE ESPERANTO EN LA OFICINA CENTRAL DE H.E.F.

En la Oficina Central que la Federación Española de Esperanto posee en la Calle Rodríguez San Pedro de Madrid ha comenzado a partir de abril un Curso Elemental de Esperanto; con esta actividad se intenta que dicho local sea útil, además de para información, para que en el mismo se impartan clases de Esperanto a personas que habiten por esa zona de la capital.

CUOTAS PARA 1980

Rogamos a cuantas personas no hayan enviado aún la cuota de miembro de la Federación, correspondiente al año en curso, lo hagan efectivo a su debido tiempo para evitar que les sea enviado el reembolso, lo que origina mayores gastos y trabajo suplementario.

VACACIONES DE VERANO

Se pone en conocimiento de todos los federados que con motivo de las vacaciones veraniegas, los servicios de Secretaría y Venta de Libros permanecerán cerrados del 16 de julio al 1 de septiembre, rogando por tanto se abstengan de enviar escritos con carácter de urgencia.

DONATIVOS RECIBIDOS 1980 (continuación)

Suma anterior	9.600 ptas.	V. Hernández Llusera ...	300 ptas.
Grupo Esperantista de Bilbao	500 ptas.	Pedro Nuez	1.500 ptas.
Tomás Apraiz	100 ptas.	Emilio Folgado	1.000 ptas.
Cecilia Gutiérrez	100 ptas.	Suma y sigue	13.900 ptas.
Rafael Palacios	100 ptas.	Socios Protectores	
Eduardo Larrouy	100 ptas.	9. Juan Martínez Mauri (1.433)	
Juan Martínez Mauri ...	200 ptas.	10. José Balbé Salas (1.001)	
Astura Donanto	200 ptas.	11. Domingo Domenech (1.594)	
Giordano Moya	200 ptas.		

LIBROSERVO INFORMAS

Je la dispono de la federacianoj estas la jenaj titoloj eldonitaj de la Hungara Esperanto Asocio:

LA FILOJ DE LA ŜTONKORA HOMO (bildrakonto), M. Jokai	250 P-toj
AVENTUROJ DE R.L.M. STULTULOF LA X-a	380 "
KAIN KAJ ABEL, S. Szathamari, 276 p.	510 "
KOKO KRIAS JAM, F. Szilagyi, 200 p.	450 "
LIBRO DE ROMANOJ, V. Benczik, 150 p.	540 "
SKLAVOJ DE DIO, Gardonyi	300 "
LA MORTO DE LA ĈIELARKO, E. Ady	325 "
SOIFO, L. Tarkony 321 p.	190 "
EN MASKOBALO, J. Baghy, 120 p.	372 "
25 JAROJ (Antologio de belartaj Konkursoj de U. E. A.)	500 "

Mendu tuj ĉe Libroservo de H.E.F.: Dos de Mayo, 4. - VALLADOLID (Hispanio).

XL-a Hispana Esperanto Kongreso

MADRID 19-24 Julio 1980
Utilaj Informoj



LOĜADO.—Ekzistas ebleco loĝi en studentaj domoj. La prezo estas, tranoktado kaj tri manĝoj, 900 pesetoj tage. Ankaŭ en Madrid ekzistas ĉiuj klasaj hoteloj kaj pensionoj kies prezojn oni povas konsulti en la turismaj oficejoj de la tuta duoninsulo.

MANGADO.—Dum la kongresaj tagoj oni povos manĝi en la Kongresejo po 135 pesetoj.

KONGRESEJO.—Ĝi estas situata en ESCUELA SUPERIOR DE INGENIEROS DE MINAS» strato Rios Rosas, 21.

PRELEGOJ.—Du prelegoj, unu hispanlingve kaj alia esperante okazos laŭ la kongresprogramo. Prelegantoj estos en la hispana, la prestiĝa kaj konata, pro siaj oftaj aperoj en T.V., lingvisto Manuel Criado del Val; prof. Francisco Azorin Poch, dumviva membro de la Hispana Esperanto Federacio, prelegos esperante. La temo estos: «Multkolora kosmo kaj griza kaoso».

EKSKURSOJ.—Du ekskursoj, unu duontaga kaj alia tuttaga, okazos dum

la Kongreso. La unua, duontaga, al Aranjuez permesos nin viziti la Reĝan Palacon kaj la Ĝardenojn. La alia, tuttaga, al Segovia kie ni povos viziti i.a. la Alkazaron kaj la Akvedukto-n kaj al la Reĝan Palacon «La Granja». Eble, ni povos viziti la fabrikon de viskio.

LIBRO-SERVO.—Dum la kongressemajno funkcios en la Kongresejo libro-servo.

KONGRESKARTOJ.—Je via dispono ni havas kartojn de la XL-a Hispana Esperanto Kongreso kies prezo estas 10 p-toj ekz. Mendu ĝin al H.E.F. Dos de mayo, 4. VALLADOLID.

PUPTEATRO.—Dum la arta vespero oni prezentos la verkon de la fama marionetistino Eloisa Solis titolita; «Mi obeas mian edzinon».

CONVOCATORIA A JUNTA GENERAL

De conformidad con lo establecido en nuestros Estatutos, se convoca a Junta General Ordinaria, que se celebrará en Madrid, el día 23 de julio, a las 12 de la mañana, en la sede del XL Congreso Español de Esperanto, con arreglo al siguiente:

ORDEN DEL DIA

- 1º Lectura y aprobación si procede del Acta de la Junta General anterior.
- 2º Lectura y aprobación si procede, del Acta de la Junta General Extraordinaria, celebrada en Gijón.
- 3º Estado económico de 1979.
- 4º Estado económico del Servicio de Libros.
- 5º Memoria de actividades realizadas del período 1-7-79 al 30-6-80.
- 6º Propuesta de sede para próximos Congresos de Esperanto.
- 7º Ruegos, preguntas y proposiciones.

EL SECRETARIO

NIAJ GRUPOJ

MADRID

Inter la diversaj aktivaĵoj de la Madrida Esperanto Liceo la pasintan marton S-ro Juan José Hernández prelegis hispanlingve en la «Oficiala Lernejo pri Lingvoj» pri la interesa temo «El Esperanto como respuesta al caos lingüístico (Esperanto kiel respondo al la lingva kaoso)». Pro la graveco de la ejo kie S-ro Hernández prelegis, oni povas konstati la grandan intereson, kiun Esperanto vekas.

VALLADOLID

La 23-an de Aprilo komenciĝis en la sidejo de la E-Grupo «Fido kaj Espero» Printempa Kurso sub gvidado de S-ano Vicente de la Parte. La kurso okazas lunde, merkrede kaj vendrede.

La 6-an de Majo je la 8-a vespere en la salono de la Grupo prelegis esperante la Sekretario de la Grupo S-ro Dativo Blanco pri la temo «Esperanto, internacia kulturilo». Post la tre interesa prelego, li montris kolorajn diapozitivajn pri diversaj artaj monumentoj de Venecio, Florencia, Romo, k.t.p. Je la fino li estis premiita per tondra aplaŭdato.

LA LINEA

La pasintan 20-an de marto en la «Domo de la Kulturo» de la grava urbo La



Linea (Cádiz), la delegito de I.L.E.I. por tiu provinco prelegis pri la temo «El Idioma Internacional». Ĉeestis ĉirkaŭ tri-dek personoj, kaj ĉe la fino okazis vigla interparolado.

Rezulte de tiu parolado S-ro Miguel Gutiérrez Adúriz estis intervjuata unue de Radio Algeciras (SER) kaj poste de la Nacia Radio. Ĉiu programo daŭris dek minutojn proksimume.

BILBAO

Ekde la 30-a de Marto funkcias en la populara Plaza Nueva stando ĉiun alternan dimanĉon kie oni akceptas subskribojn favore la peto enkonduki Esperanton kiel optativan lingvon en la dua fazo de la Generala Baza Edukado kaj oni informas pri Esperanto al la interesuloj. En tiu tasko kunlaboras ne nur la bilbaoj gejunuloj, sed ankaŭ la veteranoj.

La kunvenoj de la Grupo okazas en ĝia sidejo lunde, merkrede kaj ĵaŭde. (Laŭ Cirkulero de la Bilbao-a Esperanto Grupo).

22-a KATALUNA ESPERANTISTA RENKONTIĜO 20-aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VILANOVA I LA GELTRU.—27-a kaj 28-a septembro 1980

PROGRAMO

Sabaton 27-an: Inaŭguro de esperanta ekspozicio, publika esperanto leciono, kaj junularfestivalo.

Dimanĉon 28-an: Akceptado de la gepartoprenantoj, vizito al la aŭtoritatuloj, Katolika Diservo, 20-aj Internaciaj Floraj Ludoj, bankedo, libroservo, libero de la medalo «Klara Silbernik» k.t.p.

Por pli detalaj informoj, skribu al Kataluna Kunordiga Komitato de H.E.F.—Frenería, 1. BARCELONA-2.

ESPERANTO KAJ LA SOCIAJ KOMUNIKILOJ

La intereso pro la neceso kaj bezono de internacia lingvo kreskas konstante kaj tiu nerefutebla fakto ni povas, sen troigo, dedukti pro la granda atento ke ordinare dediĉas ĉiuj sociaj komunikiloj (gazetaro, radio kaj televido) al Esperanto kaj tio en la nunaj cirkonstancoj kiam la emo lerni kaj instrui la lingvon de la teritorio kie oni loĝas estas ne nur rajto, sed devo. Tiu fakto komentis ĵurnalisto de la tre konata revuo «DIEZ MINUTOS» menciante la paradoksan fakton ke en Barcelona oni klarigas plurajn E-kursojn kiam, laŭ la ĵurnalisto, oni devus lerni katalunan lingvon. Sed tiu ĵurnalisto forgesas, eble pro nescio, ke se ni sentas nin membroj de la internacia komunumo ni devus lerni internacian lingvon kaj ĝis nun la plej taŭga estas ESPERANTO kaj kompreneble tio ne signifas ke ni flanklasu la lingvon de la regiono aŭ de la Lando, sed kontraŭe Esperanto estas la plej granda garantio de respekto por la t.n. «minoritataj lingvoj», ĉar ne vane pere de Esperantlingvaj tradukoj oni povas koni la kulturajn trezorojn de tiuj lingvoj kaj la uzado de Esperanto en la internaciaj forumoj plene garantius la respekton por ĉiuj lingvoj evitante la lingvan diskriminacion.

Ni scias, ĉu per eltranĉaĵoj ricevitaĵoj ĉu per aliaj informoj, ke la hispana gazetaro dediĉas konstante pli kaj pli atento al la temo de la internacia lingvo kaj en tiu kampo ni devas substreki la samajn rubrikon kiu sub redaktado de nia astura samideano Sacramento Collado aperas en la Gijon-a ĵurnalo «HOJA DEL LUNES» (Lunda Folio). Ankaŭ en aliaj ĵurnaloj de diversaj hispanaj urboj kaj tendencoj aperas informojn kaj artikolojn pri Esperanto.

Por konstanta kaj regula informado pri la bezono kaj neceso de la Internacia Lingvo ESPERANTO bone taŭgas la rubrikon «Leteroj al la Direktoro» kiu ekzistas en ĉiuj ĵurnaloj kaj ni kuraĝas ĉiujn samideanojn agi en tiu kampo.

La radio ankaŭ dediĉas ĉiam kun pli da ofteco atenton al tiu temo kaj tiel la pasintan 6-an de Majo kaj pere de la plej grava radioĉeno de la Lando «S.E.R.» kaj en la programo «MEDIANOCHE» (Nokto-mezo) oni dediĉis la tutan programon, kiu daŭras unu horon, al Esperanto. Intervenis en ĉi tiu programo, persone S-ro Casquero, Prezidanto de M.E.L., kaj S-ro Ruiz Sierra, Prezidanto de la O.K. de la XL Hispana Esperanto Kongreso, kaj telefone, S-ino Urueña, Prezidantino de H.E.F. kaj S-ro Aragay, Ĉefa Redaktoro de Boletín. Notinde estas ke laŭlonge de la programo telefonis diversaj geaŭskultantoj demandante pri diversaj interesaj aspektoj de la internacia lingvo, respondante tre trafe S-ro Casquero, aŭ S-ro Ruiz.

La esperantistaj radiomatoroj, kiu konsistigas la fakan grupon ILERA estas asociaj membroj de U.E.A. kaj en nia Lando ekzistas vigla kaj aktiva grupo, kies delegito estas S-ro Joaquín EA 5 IU. Ili pere de siaj kontaktoj kun radioamatoroj de aliaj landoj havas eblecon konstati persone la utilecon de Esperanto.

Oni ne devas forgesi ke konvena kaj taŭga informado pere de iu ajn komunikmedioj estas unu el la plej bonaj rimedoj por altiri la atenton de la ĝenerala publiko, ne forgesante la Principaro pri Informado de Frostavallen kiu ankoraaŭ nun estas plene aktuala.

Samideano

FLORAJ LUDOJ

La antikva historio rakontas, ke ĉiujare en Romo ekde la jaro 173 a.k. estis organizataj Ludoj de Flora aŭ Floraj Ludoj kiel ceremonio de la diino Flora aŭ de la Floroj, diino de la printempo; de la floroj, kiuj promesas fruktojn aŭ de la espero, kies simbolo estas la floroj. Tiuj ludoj daŭris de la 28-a de aprilo ĝis la 3-a de majo kaj laŭ la nuna koncepto estis tre permesemaj kaj eĉ di-boĉaj.

En 1323 estis starigitaj en Tuluzo, laŭdire inspiritaj en la Floraj Ludoj de Romo, Floraj Ludoj por premii la plej altan poezian verkon. La unua konkurso okazis en majo de 1324. Ili estis organizataj por revivigi la trobadoran poezion kaj la poezian, okcitanan lingvon; por revivigi, do, ion preskaŭ mortintan, la lingvon ok. (oc).

Por klarigi la kaŭzon de la ruiniĝo de la lingvo ok estas necese rakonti la tiamajn historiajn cirkonstancojn.

En la 13-a jarcento la nuna teritorio de Francio vere estis du malsimilaj nacioj. La norda en kiu estis parolata la lingvo «oil» kaj la suda en kiu oni parolis la lingvo «oc». La suda estas la Langvedoko aŭ Okcitanio, no-

mata ankaŭ Provenco pro longedaŭra ligiteco kiel Provinco al Romo. Tiam Provenco havis pli altan civilizacion ol tiu de la norda Francio, kiu estis regata de la Francoj, kies origino estis el barbaraj germanaj triboj loĝintaj ĉe la rivero Rejno.

En Okcitanio floris la poezion per la trobadoroj — amkantistoj — kaj estis organizitaj festoj similaj al la floraj ludoj nomataj Kortezoj de Amo, festoj de poezio kaj muziko honore al belulinoj.

Sed la reĝo de Francio celis la unuecon kaj laŭ preteksto de la Albigena herezo, jam disvastigita en la tuta Provenco, organizis kun aprobo de la Papo krucmilitiron.

Provenco estis invadita kaj konkerita, sekvis terura mortigado, ruiniĝis la lando kaj la inkvizicio, tiam fondita, bruligis milojn kaj milojn da personoj. La centralismo de la Francoj tute venkis eĉ lingve; la okcitana lingvo kiel kulturlingvo antaŭa la franca kaj la itala restis nur kamparana lingvaĵo.

Tiu historia epizodo havas gravan rilaton al Katalunio. La Rego de Aragono Petro la Dua, la Katolika, la Nobla, helpis la Grafon de Tuluzo, estro de la Okci-

tanoj. La legato de la Papo Simono de Montfort kun siaj nomataj krucmilitistoj venkis en la batalo de Muret (jaro 1213). La katalunaj kaj aragonaj militistoj estis venkitaj kaj la reĝo Petro mortigita.

Se en tiu milito la okcitanoj ne estus venkintaj, nun eble Provenco, Katalunio kaj Aragono estus unu ŝtato.

Elmigrantaj okcitanaj trobadoroj kaj katalunaj trobadoroj kulturis la poezion en la kataluna lingvo, lingvo parenca aŭ devenanta de la okcitana. Tiam la kataluna lingvo kaj Katalunio tre prosperis, regis Jakobo unua, la Konkerinto, filo de Petro la Katoliko mortigita en la batalo de Muret.

Laŭ imito de tiuj de Tuluzo okazis Floraj Ludoj en Llejda en 1338 kaj en Barcelono en 1395-1398 kaj de tiam al tiam en la dek Kvina jarcento.

La kataluna lingvo pro historiaj okazaĵoj havis la saman sorton kiel la okcitana, velkis, restis neoficiala kaj nur parolata de la ordinara popolo.

En la pasinta jarcento (1859) en la nomata kataluna Renesanco oni restarigis la Florajn Ludojn kun la sama ceremonio de la tuluzaj kaj kun la sama celo revivigi velkintan lingvon. La kataluna lingvo reviviĝis kaj kun la gramatiko de Pompeu Fabra fariĝis kulturlingvo egalkvalita al la aliaj eŭropaj kulturlingvoj.

En 1909 okaze de la kvina Internacia Esperantista Kongreso kun ĉeesto de Zamenhof, okazis literatura konkurso, kiu en memoro de la kataluna Renesanco estis starigita kiel Floraj Ludoj kun la sama ceremonio. Vere la esperantismo tre sukcesis laŭ nombro kaj kvalito kaj ĉiujare, okazis la internaciaj Floraj Ludoj ĝis alia historia ŝtormo tre simila al tiu, kiu premadis Okcitanion en la mezepoko falis sur Katalunion kaj tiel la kataluna lingvo kiel esperanto velkis.

En tiu ĉi pasinta epoko oni organizis eksterlandajn Katalunajn Florajn Ludojn kaj en la pasinta jaro 1978 en la Kataluna Renkontiĝo en Tortosa estis restarigitaj la Floraj Ludoj kiel simbolo de nova renesanco de Esperanto en Katalunio.

Oni nun povas trovi la Florajn Ludojn kiel eksmodaj ceremoniaĵoj de la mezepoko kun la reĝino kaj ties kortezo, k.t.p. Sed konsideru, ke la reĝino povas esti kiel en Okcitanio antaŭ la krucmilito ankaŭ belulino kun kortezo de amo kaj amkantistoj, aŭ kiel en Romo la diino Flora. Sed antaŭ ĉio ili estas simbolo de renesanco aŭ renaskiĝo post velko pro perforta subpremado. Daŭru do ĉiujare la Floraj Ludoj kaj estu ne nur simbolo aŭ espero sed fakto por Esperanta florado.

G. Moya

ESPERANTO KAJ LA REFORMEMULOJ

Ekzistas en la mondo, miloj da lingvoj kun diversaj teritoriaj distingiĝoj. Sed multaj el ili nur estas parolataj. Tio estas, lingvoj, kiuj ne posedas skribadon, signojn.

Nuntempe ĉiugrava kulturlingvo posedas samgrade parolojn kaj vortojn, oficialigitaj de iu ajn kultura organizaĵo. Por la esperantistaro tia organizaĵo estas la «AKADEMIO», kies rolo estas gardi la lingvon je sia disigiĝo kaj krome, eviti la lingvan stagnon, zorgi pri la adaptiĝo de la evoluo de la lingvo al la progresoj de la scienco kaj la tekniko. Pro tio la Akademianoj, post la konsideroj de la plej elstaraj lingvistoj kaj literaturistoj oficialigas la novajn necesajn vortojn.

Ĝenerale la parolata lingvo ne havas unuecon, ĉar ekzistas malsimilan prononcadon de la sama lingvo eĉ de unu urbo al la alia. Kontraŭe por la skriba lingvo estas nepre sama, unueca inter la verkistoj, malgraŭ ili hejme prononcos ion malsimile ĝin.

Esperanto pro sia mem internacieco en la tuta mondo nepre bezonas firman skriban unuecon, ĉar sentia unueco ĝi tuj disfalus en diversaj dialektoj kaj ne utilis kiel internacia lingvo.

Esperanto kiel planlingvo estas konscia kulturkreaĵo, sed ne artefarita lingvo, ĉar ĝiaj eroj estis elprenitaj el la precipaj idiomoj. Fundamento t.e. la kolekto de la 16-regula gramatiko, de la Universala Vortaro

k. de la Ekzercaro sankciita de la Bulonja Kongreso estas kune kun la preskaŭ centjara historio de nia literaturo, firmegan bazon por ne konsideri serioze ortografian ŝanĝon.

Tamen en la unuaj tempoj de Esperanto bruis kelkaj reformistoj kaj ankoraŭ de tempo al tempo aperas reformemuloj, lastempe pri la ortografio.

Se la reformemuloj estus geniaj verkistoj kompareblaj al «Shakespeare» aŭ «Cervantes» ili jam apartenus al la Akademio kaj iliaj proponoj, kvankam ĉiam neoportunaj por la internacia konsisto de la esperantista popolo kaj la jam vasta tradicia heredaĵo, povus eble esti konsiderataj de la Akademio. Sed neniu reformisto verkis elstaran verkon kaj tio montras, ke la reformemo ne havas la kialon en la kvalito de la lingvo, sed en la manko de kreokapablo. Ne ŝajnas, do, pozitive, ke tiuj, kiuj ne distingiĝas per sia kreopovo fariĝu plibonigistoj.

La averto de la Prezidanto de la Akademio de Esperanto William Auld kontraŭ la reformemo pravas pri la netuŝebleco de la Fundamento. Formordi la Fundamenton estas ruinigi ĉion sur ĝi konstruita. Sur firma fundamento oni starigu la plej grandan konstruaĵon de vasta kaj altnivela literaturo, ĉar tiu ĉi estas kio precipe difinas Esperanton kiel kulturportanto je monda skalo.

G. Moya

PECHAN, ALFONSO (kaj aliaj)

«Gvidlibro por Supera Ekzameno»

Hungara Esperanto Asocio (Budapest) 1979

358 p. 18x11 cm. Prezo: 510 p-toj.

La libro konsistas el tri partoj: «Skizo de la Internacia Lingvo», «Skizo de Esperanta Literatur-historio» kaj «Metodiko».

La unua parto ekzamenas planlingvojn antaŭ kaj post Esperanto, parolas pri Zamenhof kaj lia krea laboro, kaj sin etendas finfine pri la historio de la movado kaj la esperantistaj mondaj organizaĵoj, kun speciala ĉapitro pri Esperanto en Hungarujo, kie la libro estas eldonita. Ĝi estas tre bone kompilita teksto, kies sumon da konoj ni povus alimaniere akiri nur per legado de sennombraj libroj: Krestomatio, historioj de Brügemman, Privat, Boulton, Lapenna, verkaro de Zamenhof, ktp., ktp.

La «Skizo pri Literatur-historio» (Balkanyi, Vatré, Kalocsaj), eseeas komence pri Esperanto kaj literaturo, kaj poste pritraktas la tri periodojn en nia literaturo, kiuj sin etendas tra la jaroj antaŭ, inter kaj post la du Mondmilitoj. En tiuj periodoj oni distingas la diversajn skolojn, ekzamenas prozon, poezion, kaj tradukojn, donas mallongajn biografiojn de la plej elstaraj verkistoj kaj oni majstre komentarias pri la karakterizoj kaj valoroj de homoj kaj skoloj, same kiel pri diversaj bazaj tekstoj: «Fundamenta Krestomatio», «Plena Gramatiko» kaj «Enciklopedio de Esperanto». La superrigardo estas vere akuta, instrua kaj lumiga.

En la tria parto de la libro, «Metodiko», Dro. I. Szerdahelyi parolas pri la diversaj metodoj instrui esperanton, kaj amplekse komentas la Cseh-metodon, por poste elmontri ankaŭ la modernan KA-metodon (Kompleks-Aktiva), kiu sin helpas per lingvo-laboratorio kaj magnetofonaj bendoj. Li eksplikas la teorion de la informado kaj tre detale disvolvas instru-teknikon kaj distribuon de la lecionoj de tuta kurso de esperanto, laŭ scienca teorio kaj longa profesia praktiko. La «Metodiko» de Dro. Szerdahelyi havas la altan valoron veni el homo, kiu posedas superajn konojn pri lingvistiko samkiel propran sperton pri lingvo-instruado. Lia verko, do, multe povas utili al instruistoj, kies intuicia laboro povos nun sin apogi sur solida profesia bazo.

La libro, entute, perfekte respondas al la postuloj de sia titolo, kaj

oferas ampleksan —kaj necesan— bazon por akiro de klare difinita esperantista kulturo. Ĉar la nura ekzisto de tia libro —kaj de la Superaj Ekzamenoj— implicas, ke ne sufiĉas bone posedi esperanton plus kontentigan ĝeneralan kulturon ene de la gepatra lingvo, sed ke esperantisto necesas ankaŭ havi la plej eble bonan konon pri la historio de esperanto, ĝia literaturo kaj verkistoj, samkiel pri la nuntempa organizo de la movado, ĝia problemaro kaj marŝado.

Konklude, tre valora verko, firma helpo por tiuj dezirantaj libere sin movi tra la kampo de la historio, literaturo kaj specifa kulturo de la esperantista mondo.

JES

LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO

John Wells

Rotterdam: Universala Esperanto Asocio 1978, 76 p.
23 cm.

Mendebla ĉe Libroservo de Hispana Esperanto Federacio. Prezo 475 p-toj «Kia Lingvo estas Esperanto?»

Tio estas la unua frazo de sorĉe interesa libro ĵus aperinta ĉe Universala Esperanto-Asocio, sub la titolo «Lingvistikaj aspektoj de Esperanto», Sur 76 paĝoj la aŭtoro, John Wells, respondas tiun demandon el strikte lingvosciencia vidpunkto. La leganto ne atendu trovi ĉi tie senpruvajn asertojn, ke Esperanto estas «facila», «logika» aŭ «fonetika». La aŭtoro —lekciisto en la fonetika fakoj de unu el la kolegioj de la universitato de Londono rigardas la fonetikon, morfologion, sintakson, leksikon kaj semantikon de la Internacia Lingvo en la lumo de la moderna lingvistiko kaj en komparo kun granda nombro da naciaj lingvoj el diversaj familioj.

En tiu ĉi verko la leganto trovas respondojn ekzemple al la demandoj: Kie situas Esperanto en la klasifiko de ĉiuj lingvoj? Kio ĝuste konsistigas «bonan» prononcon de Espe-

ranto? Ĉu vere Esperanto estas lingvo aglutina? Ĉu la lingvo vere havas aŭ povas havi «liberan» vortordon? Kaj eĉ - ĉu Esperanto estas lingvo seksisma? La amaso da ekzemploj, kiuj klarigas tiujn kaj aliajn demandojn, estas abunde dokumentitaj per fontocitoj kaj per ampleksa bibliografio. Krome, la lingvistike laika leganto trovas grandan helpon en indekso de terminoj, kiu por ĉiu faka termino indikas la paĝon, sur kiu ĝi unuafoje ricevas difinon aŭ klarigon.

La libro de d-ro Wells baziĝas sur serio de prelegoj prezentitaj en la kadro de Internacia Somera Universitato en la 61a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno en 1976. Intertempe la materialo estis multe prilaborita, interkonsiliĝe kun estraranoj de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, sub kies nomo ĝi estas nun eldonita.

INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ



65-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Dum la Kongreso okazos la 33-a sesio de Internacia Somera Universitato kaj en ĝi prelegos elstaraj personoj de la Universitata vivo el 12 landoj, pri la plej diversaj temoj. Inter ili ni mencias: W. Bormann «Diskriminacio pro hejmlando»; Wim M.A. De Smet «Abundoj kaj malabundoj de fokoj»; M.I. Isaev «Pri la soveta sperto en la likvido de la socia kultura diskriminacio»; Esteban Emilio Mosonyi «Religia diskriminacio kontraŭ indianoj»; Carl Stop-Bowitz «Koralrifoj tropikaj kaj arktikaj» H. Tonkin «Juĝo kaj antaŭjuĝo en Otelo de Shakespeare» k.t.p.

Ankaŭ interesa estas la fakto ke la Pola Esperanto Teatro prezentos «Malfermu la pordon» de la usona verkisto K. Cholinski, kaj ankaŭ oni esploras la eblecon prezenti iujn el la dramaj verkoj premiitaj en belartaj konkursoj.

Laŭ la revuo Esperanto, ĝis aprilo, aliĝis preskaŭ 1.300 personoj el diversaj landoj.

SOMERA ESPERANTO UNIVERSITATO EN GYULA (Hungario)

Okazos ĉijare de la 6-a ĝis la 12-a de julio; apud la ĝisnunaj popularsciencaj prelegoj, oni organizos ankaŭ sciencajn grupkunvenojn pri kelkaj gravaj temoj. Tiuj grupkunvenoj havos sciencajn karakteron. En 1980 du sciencaj temoj estos diskutataj enkadre de la grupkun-

veno; «La aktualaj problemoj de la lingva komunikado en la sciencoj» kaj «Aktualaj problemoj de la geosciencoj en la Danubo-baseno».

Krom la supre menciitaj temoj, dum S.E.U. okazos la sekvaj prelegoj:

1. La rolo de nia patrio post Helsinki.
2. Laŭ la blua Danubo.
3. La grandaj majstroj de la muziko: Bela Bartok.
4. La pentroartisto György Kohán.
5. A.T. Ponori: La plej malgrandaj ĉelobjektoj.
6. Tibor Sekelj: Per Esperanto tra la mondo.
7. Esperanto en Sovetunio.
8. Esperanto en la praktiko.
9. M. Szabó: Lingvoprojektoj de hungaraj sciencistoj.

Se iu deziras pli detalan informon skribu al: Hungara Esperanto Asocio, Pf. 193 H-1.368 BUDAPEST (Hungario).



Okazonta en Rauma (Finnlando) de la 25-a julio ĝis la 1-a de aŭgusto, sub la Alta Protektado de la Guberniestro S-ro Paavo Aitio. Dum la kongressemajno ĉiuvespere, post la cetera programo, varmegos la ŝtonoj sur la forno de ĉamara saŭno, tio L.K.K. organizos antaŭvidante grandan interesiĝon pri la saŭno.

La kongresan ĉeftemon «Popola tradicio en la nuntempa mondo» pritraktos plej diversaj laborgrupoj kaj prelegoj: Festoj kaj estonteco en Japanujo; Kiel popoloj fariĝas nacioj; Streĉoj de modernigo en la Mediteranea regiono, k.t.p.

JURA HISTORIO KAJ HOMAJ RAJTOJ EN INTERNACIA JURA REVUO

En decembro 1979 aperis la 48-paĝa numero 2/1979 de Internacia Jura Revuo (IJR), organo de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj.

Tiu ĉi numero estas ĉefe dediĉita al jura historio kaj homaj rajtoj. Prof. D-ro S. Anagnostakis koncize pritraktas la jurpunajn ideojn, plu aktualajn, de Aristotelo, unu el la plej grandaj pensuloj de ĉiuj epokoj, dum kand. jur. T. A. Hoeg lerte prezentas kaj klare komentas plurajn interesajn aspektojn de sklaveco laŭ antikvaj leĝoj. Eĉ tiuj du elstaraj kontribuajtoj estas iusence ligitaj al la homaj rajtoj, sed la artikolo de D-ro K. Perko pri la homaj rajtoj en Aŭstrio kaj tiu de advokato G. Griniatsos pri Internacia Amnestio rekte rilatas al tiu vasta sfero de internacia, kompara kaj interna juro, tre grava por la persona libereco de ĉiu individuo. Ankaŭ la unua el la pluraj eroj en la rubriko Notoj, en kiu la redaktoro, Prof. I. Lapenna, korektas miskomprenon de juro pri homaj rajtoj kaj misprezenton de historiaj faktoj, estas ligita al la du ĉeftemoj. En la rubriko RECENZOJ aperas kritika recenzo-artikolo pri la anglalingva traduko de verko reflektanta la nuntempan sovetan koncepton de internacia juro. La OFICIALA INFORMILO enhavas plurajn informojn por la membroj kaj abonantoj.

Konforme al la promeso en la antaŭa numero, en kiu aperis Serio A de Sugestoj por Kompletigo de la Jura/Diplomatia Terminaro de D-ro L. Dubravsky, nome terminoj netroveblaj en **Plena Ilustrita Vortaro**, tiu ĉi numero enhavas Serion B de la Sugestoj. Temas pri novaj signifoj aldone al tiuj entenataj en la **Plena Ilustrita Vortaro** de Prof. G. Waringhien. La sugestoj de D-ro Dubravsky estas plia kontribuo al la vastigo de la jura-diplomatia terminaro, kiun IJR evoluigas jam dum multaj jaroj.

IJR aperas du fojojn jare kaj ĉiu numero estas 48-paĝa plus kovrilo. Kvankam faka, laŭ sia enhavo ĝi estas interesa ne nur por juristoj, sed por ĉiuj kleraj personoj, kiuj interesiĝas pri aktualaj juraj demandoj en diversaj juraj branĉoj. La membroj de IEAJ (kotizo 120 aŭstraj ŝilingoj jare) ricevas la revuon senpage, sed ĝi estas abonebla ankaŭ ekster la membreco, kaj la jara abono estas same 120 ŝil. aŭ egalvaloro jare. **La kotizojn, abonojn kaj kontribuojn por la Fondajo IJR akceptas la sekretario-kasisto D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, poŝta ĉekkonto nr-o 1257.845.**

LASTMOMENTA INFORMO

Proksimume 300 gesamideanoj de 15 landoj partoprenis la 32-a I.F.E.F. Kongreso okazinta en Ameriko (Nederlando) de la 16-a ĝis la 22-a de Majo. En venonta numero ni esperas aperigi pli longan kaj detalan raporton pri tiu grava Kongreso.

DEZIRAS KORESPONDI

Profesia operet-kantisto el Bulgario. Serĉas korespondanton el Hispanio, kiu povus traduki (laŭvorte) hispanajn kantojn en Esperanton. S-ro Prodan Prodanov.—PK 14, BG-1220 SOFIA.

Kun filatelistoj: S-ro Ladislav Sera, Komenskeho 44.—042 22 KOSICE SPSE-PS-D-42 - C.S.S.R.

Fraŭlino Danica Matiova. Ŝi estas 20-jara kaj studas en supera teknika lernejo. Ŝi deziras korespondi al geĥispanoj por reciproka amikiĝo. Adreso. str. Sov. armady 291. 040 01 KOSICE Ĉehoslovakujo.

Alfjorova Jrina, 20-jara, pedagogo pri muziko, deziras korespondi pri la jenaj temoj, E-Movado, arto, muziko, poezio, arkitekturo, turismo, b.k., p.m. Adreso: Peŝĉanaja 4-50 252055 KIEV Ukrainio - U.R.S.S.

NEKROLOGO

La 10-an de Majo forpasis en Valladolid, la bonkora kaj aktiva membro de la E-Grupo «Fido kaj Espero» kaj de la Hispana Esperanto Federacio S-ro Juan Miguel Piquero. Li lernis la internacian lingvon en Valladolid la jaron 1966 kaj de tiam li konstante kaj senpaŭze propagandis Esperanton kaj tre aktive laboris en la agado de la loka E-Grupo kies estrarano li, plurfoje, estis.

S-ro Piquero neniam mankis al la diversaj aranĝoj organizitaj de la Grupo «Fido kaj Espero» kaj lia lasta veno en la sidejon estis okaze de prelego de D-ro Gil Contreras.

La familia nomo Piquero ne malaperas de niaj vicoj, ĉar feliĉe li sciis altiri plurajn de siaj gefamilianoj al Esperanto.

Profesie li estis tre aktiva kaj diligenta kaj tion pruvas la fakto ke li estis premiita de la Ministerio de Agrokulturo per la Ordeno de la Agrikola Merito.

Al lia vidvino, gefiloj kaj gefamilianoj ni esprimas nian plej sincerajn kondolencojn.

Ripozu pace nia kara samideano kaj amiko.

L. H.

XL-a Hispana Esperanto Kongreso

MADRIDO 19-24 Julio 1980

PROGRAMO



Sabato 19

- 11 h. Disdonado de dokumentoj al la gekongresanoj
- 12 h. Inaŭguro de Ekspozicio en la Nacia Biblioteko
- 19 h. Interkona Vespero

Dimanĉo 20

- 8 h. Duontaga ekskurso al Aranjuez
- 18 h. Meso en Esperanto
- 19 h. Arta Vespero (Korusoj kaj Dancoj. Filmo. Marionetoj)

Lundo 21

- 9,30 h. **Samtempaj aktoj:**
 - Ekzamenoj
 - Kunsido de la Estraro de H.E.F. kun Grupdelegitoj
 - Aŭdiovida klaso de Esperanto
 - Vizito al la Minerala Muzeo de la Lernejo pri Minoj.
 - Vizito al la eksperimenta mino
- 12 h. Solena Inaŭguro de la Kongreso
- 13 h. Festparolado
- 18 h. Projekcio de lumbildoj (komentarioj de M. Korniluk)
- 19 h. Prelego en Esperanto de D-ro Francisco Azorin Poch
- 22 h. Dancado

Mardo 22

- 10 h. Fakaj Kunvenoj
- 12 h. Parolado pri «Esperanto en la lernejo»
- 14 h. Oficiala Bankedo en Restoracio El Blasón
- 19 h. Parolado pri la revuoj «JUNECO» aŭ «BOLETIN»
Parolado pri «Traduk-Banko»
- 20 h. Prelego en hispana lingvo de la hispana akademiano Prof. Manuel Criado del Val

Merkredo 23

- 10 h. Oficiala Inaŭguro de strato Esperanto
- 12 h. Generala Kunsido de Hispana Esperanto Federacio
- 20 h. Solena Fermo de la Kongreso. Disdono de atestiloj kaj de Premioj de la Literatura Konkurso.

Ĵaŭdo 24

- 9 h. Tuttaga ekskurso al Segovia.